# BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-60)
# I N F O R M I L O No 2

La 60-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-60) okazos de la 4-a ĝis la 11-a de julio 2026 en Rigo – la ĉefurbo de Latvio. La urbo situas ĉe la suda marbordo de la Riga Golfo de la Balta Maro. La historia centro de Rigo situas ĉe la dekstra bordo de la rivero Daŭgavo, proksimume 10 km de ĝia enfluejo en la Rigan Golfon. La antikva urboparto de Rigo estas registrita en la listo de la Monda Kulturheredaĵo de Unesko. Rigon oni nomas la metropolo de secesia stilo (Art Nouveau, Jugendstil), ĉar en ĝia centra parto proksimume 40% el ĉiuj domoj estas secesi-stilaj konstruaĵoj, kio estas multe pli ol en aliaj eŭropaj urboj.

**BET-ejo:** Riga Teknika lernejo pri turismo kaj kreiva industrio (latvalingve: Rīgas Tūrisma un radošās industrijas tehnikums), strato Nīcgales 26, Rigo.
La alveno al BET-60 la 4-an de julio, forveturo – la 11-an de julio.

**LOĜADO**

En la studenta hotelo de la Teknika lernejo (strato Nīcgales 26):
1) po 30 EUR diurne por persono en dulita – kvarlita ĉambro (duŝejo kaj necesejo por du ĉambroj);
2) po 45 EUR diurne por persono sola en dulita – kvarlita ĉambro (duŝejo kaj necesejo por du ĉambroj).
En hoteloj de Rigo (rezervado memstara).
Se vi ankoraŭ ne pagis pri loĝado, faru tion senprokraste. Se vi pro iu kaŭzo povas pagi nur surloke, konfirmu, ke viaj planoj, alven- kaj forirdatoj ne ŝanĝiĝis, aliokaze por vi loko en la studenta hotelo ne estos garantita, ĉar hotelo postulas antaŭpagon pri ĉiu rezervita numero. Pri ajnaj ŝanĝoj informu senprokraste.

**MANĜADO**.

Manĝado – matenmanĝo kaj tagmanĝo estos organizita en la manĝejo de BET-ejo laŭ anticipa mendo. Prezo por matenmanĝo – 6 €, por tagmanĝo – 10 €. La unua organizita manĝo – tagmanĝo estos dimanĉe la 5-an de julio, la lasta – matenmanĝo sabate la 11-an de julio. Vespermanĝo memstare en diversaj kafejoj kaj restoracioj de Rigo.
Merkrede, kiam okazos tuttaga ekskurso, tagmanĝo en hotelo ne estos servata.
Lunde dum Jubilea Vespero – solena vespermanĝo (salatoj, diversaj manĝetoj, jubilea torto, ĉampano), kantado kaj dancado – prezo 15 €.
Pri manĝado eblas pagi surloke.

**PROGRAMO**

Registrado funkcios la 4-an de julio ekde 10.00 – 21.00.
La unua programero la 4-an de julio – Interkona vespero je la 19.00.
La Solena Malfermo dimanĉe – la 5-an de julio, je la 11.00 en la Salono de Teknika lernejo. Ekde lundo okazos dunivelaj Esperanto-kursoj (por komencantoj kaj paroliga, gvidataj de konataj Esperanto-instruistoj), funkcios Somera Universitato, estos ebleco partopreni seminarion pri ĵurnalismo, Origamian atelieron, pruvi sian lingvoscion, eltrovemon kaj spritecon en la intelekta ludo "Komprenu min", estos riĉa vespera programo – diversaj koncertoj, Jubilea Vespero, Ĝardena festo (Adiaŭa Vespero).
Dum BET funkcios libroservo, aperos ĉiutaga BET-informbulteno "Ondo de Daugava"

Vidu apartan paĝon ***Programo*** en la maldekstra menuo.

**Ekskursoj**

Vidu apartan paĝon ***Ekskursoj*** en la maldekstra menuo.

**Kiel atingi BET-ejon**

Baldaŭ en la maldekstra menuo aperos aparta paĝo pri la publika transporto de Rigo, kiel atingi BET-ejon kaj informo pri proksimaj vendejoj, kafejoj, restoracioj.

Numero de la poŝtelefono de la prezidantino de la Organiza Komitato de BET-60 Margarita Želve +371 26407174, retadreso: margarita.zelve@gmail.com

BONVENON al Rigo!
Organiza Komitato de BET-60